# LA EPISTOLO DE LA APOSTOLO PAŬLO AL FILEMON

1 Paŭlo, malliberulo por Kristo Jesuo, kaj
Timoteo, la frato, al Filemon, nia amato kaj
kunlaboranto, 2 kaj al Apfia, la fratino, kaj al
Arĥipo, nia kunbatalanto, kaj al la eklezio en via
domo: 3 Graco al vi kaj paco de Dio, nia Patro,
kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo.

4 Mi ĉiam dankas mian Dion, memorigante pri
vi en miaj preĝoj, 5 aŭdinte pri via amo kaj pri
la fido, kiun vi havas al la Sinjoro Jesuo kaj al
ĉiuj sanktuloj; 6 por ke la partoprenado en via
fido fariĝu energia per la sciigo de ĉiu bonaĵo,
kiu estas en vi, por Kristo. 7 Ĉar mi tre ĝojis kaj
havis multon da konsolo pro via amo, ĉar la koroj
de la sanktuloj refreŝiĝis per vi, frato mia.

8 Kvankam do mi havas plenan kuraĝon en
Kristo, por ordoni al vi tion, kio estas konvena,
9 tamen pro la amo mi preferas petegi tia,
kia mi estas, Paŭlo, maljunulo kaj nun ankaŭ
malliberulo pro Kristo Jesuo; 10 mi petegas vin
koncerne mian filon, kiun mi naskis en miaj
katenoj; tio estis Onesimo, 11 kiu estis iam
senutila por vi, sed nun estas utila por vi kaj
por mi; 12 mi ĵus resendis al vi lin mem, alivorte,
mian propran koron; 13 lin mi volonte ja tenus
apud mi, por ke anstataŭ vi li estu al mi helpanto
en la ligiloj de la evangelio; 14 sed mi nenion volis

fari sen via konsento; por ke via boneco estu ne
kvazaŭ deviga, sed laŭvola. 15 Ĉar eble li pro tio
estas apartigita for de vi por kelka tempo, por
ke vi havu lin por ĉiam; 16 jam ne kiel sklavon,
sed kiel pli bonan ol sklavo, kiel fraton amatan,
precipe por mi, sed des pli por vi, kaj en la karno
kaj en la Sinjoro. 17 Se vi do rigardas min kiel
kunulon, akceptu lin tiel same, kiel min mem.
18 Se tamen li faris ian malhonestaĵon, aŭ ŝuldas
ion al vi, tion enkalkulu en mian konton; 19 mi,
Paŭlo, skribas per mia propra mano, mi ĝin
repagos; mi tamen ne diras al vi, ke vi viaparte
ŝuldas al mi eĉ vin mem. 20 Jes, frato mia, lasu
min havi plezuron de vi en la Sinjoro; refreŝigu
mian koron en Kristo. 21 Fidante pri via obeo,
mi skribas al vi, sciante, ke vi faros eĉ pli multe,
ol kiom mi diras. 22 Sed krom tio pretigu por
mi gastoĉambron; ĉar mi esperas, ke mi, laŭ viaj
preĝoj, estos donita al vi.

23 Salutas vin Epafras, mia kunmalliberulo en
Kristo Jesuo, 24 Marko, Aristarĥo, Demas, Luko,
miaj kunlaborantoj.

25 La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu kun
via spirito. Amen.

# Londona Biblio
## The Holy Bible in Esperanto (1910)

Public Domain

Language: Esperanto

2020-02-13

PDF generated using Haiola and XeLaTeX on 11 Nov 2022 from source files dated 13 Feb 2020
66d4141f-915d-52bc-b744-29459ca87515